


BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



2

FEBRUARO 1960 * JARO XXIX

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov

Redakta komitato: Ivan Sarafov,
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanancoj — 1 levo por vor-
to; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nume-
ro de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa monato.
Nur kiel escepto gravaj aktua-
laj materialoj estos akceptitaj
ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda interli-
nia spaco kaj marĝeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.

Decidoj de la tria plenkunsido
de CK de BEA. 1

Direktivo de la sindikatoj pri
malfermo de E-kursoj 5

Novaj societoj 6

Organiza vivo (D. Ĉolakova, St.
Kadiev, V. Dimitrova — «M.
Gorkij» — Sofio, Ŝ. Kuzev —
Breznik. A. Pânĉev — Kazan-
lâk, D. Ivanov — Plovdiv) 8

N. Nikolov. Nova etapo en nia
organiza agado. 9

La rezulto de la belarta konkur-
so 9

I. Jelev. Jarcento (versaĵo) 10

S. Ĉirpanliev. La lingvo de la
paco (versaĵo) 11

I. Kolarov. Esperanto. La verda
stelo (versaĵoj) 11

V. Vasilev, N. Stefanov. Trifon
Ĥristovski 12

St. M. Kio estas via nomo aŭ
kia estas via nomo 14

Instrua konversacio 14

Bulgara Esperanto-vortaro 15

B. Triĉkov, C. Radoslavov. Kara
hejma ter' (kanto) 16

Flego Srdjan. Internacia asocio
de teatraj kaj filmaj artistoj 16

Sur la kovrilo: Târnovo — la ur-
bo de nia 34-a

Ni kreu Balkanan esperantistan konkordan komitaton.

Por ĉiuj oficialaj gastoj ni organizu laŭeble ekskurson tra la lando por konatigi al ili niajn vidindaĵojn kaj atingadojn.

La estraro aperigu la aliĝilojn ne pli malfrue ol la 15-an de februaro. Krom la kongreskarto estu presotaj delegitkartoj en alia koloro.

La estraro aperigu kongresan afiŝon kaj aldonu specialan poŝtkarton pri Târnova Esperanto-kongreso.

Ni devas nepre atingi la ciferon de 1400 aliĝintoj al la kongreso el la lando.

Normo por la delegitoj: unu delegito por ĉiuj 10 regulaj membroj aŭ parto de dek. Por bazo oni konsideru la mezan nombron de la membraro en 1959 kaj la unua duono de 1960. La societoj devas elŝuldiĝi la membrotizon por la unua duonjaro de 1960 ne pli malfrue ol la 1-a de junio 1960. La kotizintaj post tiu dato membroj ne estos konsiderataj ĉe la kalkulo de la reprezenteca rajto.

La raporto de la estraro de CK de BEA estu multobligota kaj anticipa sendota al ĉiuj delegitoj.

La duobla 8—9 numero de BE estu dediĉita al la kongresa laboro.

La kongresa komitato aperigu kongresbultenon stencilite. La ĵurnalista sekcio prizorgu la regulan aperadon de informoj k. a.

DECIDOJ

de la tria plenkunsido de la CK de BEA rilate la plenumon de la decidoj de la 33-a kongreso de BEA kaj de la dua plenkunsido de la CK

La tria plenkunsido de CK de BEA, okazinta la 31-an de januaro 1960 en Sofio, aŭskultinte la raporton de la prezidanto de la CK k-do

G. Dolapĉiev pri la plenumo de la decidoj de la 33-a kongreso de BEA kaj de la dua plenkunsido de CK,

KONSTATAS:

1. La decidoj de la 33-a kongreso de BEA grandparte estis plenumitaj. Iuj el ili devas esti finplenumitaj.

2. La decidoj de la dua plenkunsido, rilate la organizajn taskojn de BEA grandparte estas plenumitaj kaj la rezultoj atingitaj en 1959 jaro estas malpli bonaj ol en 1958.

Aktiviĝis iuj ne tiel viglaj en la pasinteco societoj: Gabrovo, Dimitrovgrad, Kazanlâk, Blagoevgrad, Pleven, Ruse, St. Dimitrov kaj iuj aliaj, sed montris malprogreson iuj tre viglaj societoj en la pasinteco:

Kolarovgrad, Varna, Kubrat, v. Borima, v. Borovo, Gorna Orjahovica, Kârĝali, Peŝtera kaj multaj aliaj. Iuj societoj montras nenian plikreskon.

Ĝenerale ne pliboniĝis la organiza disciplino en nia asocio, kvankam la kontakto inter la CK kaj la societoj plifirmiĝis kaj pli reguliĝis, pliboniĝis la laboro de la asocia kancelario, akceliĝis la respondado al la ricevataj leteroj. Malgraŭ tio ekzistas ankoraŭ multaj mankoj en la laboro, kiel en la CK tiel ankaŭ en la lokaj societoj, rezulte de kio la kotizinta

asocia membraro fine de 1959 estas nur 2444 kontraŭ 2824 fine de 1958. La abonantoj de la asocia presorgano «Bulgara esperantisto» en 1958 estis 1423 kaj en 1959 — 1246.

La buĝetaj enspezoj de membrokotizo en 1959 estis efektivigitaj nur 61% kaj de abonkotizoj por «BE» nur 55.3%.

En 1959 jaro sukcese estis organizitaj ok distriktaj esperantistaj konferencoj.

3. Nekontentige estas plenumita la rezolucio de la dua plenkunsido rilate la lokon kaj la aktivecon de la bulgaraj esperantistoj en la tutpopola movado por plenumo de la tria na-

cia ekonomia kvinjara plano en reduktitaj templimoj. Ne regule estis observata kaj gvidata la agado tiurilate. Niaj eldonaĵoj «BE» kaj «Internacia ĵurnalisto» kaj «Nuntempa Bulgario» ne publikigis niajn informajn statistikajn materialojn pri la grandiozaj atingaĵoj en tiu ĉi tutpopola movado. La ĵurnalista sekcio ĉe CK de BEA ne plenumis sian patriotan kaj esperantistan devon tiurilate.

Konsiderante la raportitajn rezultojn de la plenumo de la kongresaj decidoj kaj la decidoj de la dua plenkunsido, la tria plenkunsido de CK de BEA

DECIDIS:

1. Komisias al la Estraro de CK de BEA pere de la respektivaj fakoj garantii la finplenumon de la decidoj de la 33-a kongreso kaj konkrete:

a) p. 3 — ĝustatempe plani kaj prizorgi la eldonon de la lernolibroj kaj lernhelpiloj, propagandaj materialoj k. a.; organizi la internacian korespondadon, gvidante, regule observante kaj raportante pri ĝi.

b) p. p. 9, 12, 18 kaj 21 — krei kontakton kaj konstantan kunlaboradon kun la ceteraj sociaj amasaj organizaĵoj kaj kun la kulturaj institucioj kaj institutoj.

c) p. p. 10 kaj 15 — organizi ekzamenon por kursgvidantoj dum la 34-a kongreso en Târnovo.

d) p. 11 — kontakti kun «Balkan-turist» pri eldono de diversaj prospektoj en Esperanto.

e) p. 20 — organizi konstantan enlandan migrantan ekspozicion.

2. Komisias al la estraro de CK de BEA por plenumo de la decidoj de la dua plenkunsido pri la organizaj taskoj de BEA:

a) Ĝis la fino de marto k. j. ĝustigi la organizan staton de ĉiu loka esperantista societo rilate membrojn,

membrokotizojn, abonojn por «BE», enketfoliojn, estrarojn, adresojn de estraranoj k. s.

b) Postuli de la societoj regulajn trimonatajn raportojn pri membroj (laŭ persone), kolektita kaj transpagita membrokotizo, abonkotizo por BE, kursoj kun partoprenantaj kursanoj, aliaj entreprenoj kaj aranĝoj.

c) Fine de ĉiu sesmonato CK publikigu en «BE» raporton pri la organiza stato kun sugestoj, rekomendoj kaj instrukcioj.

d) Ĝis la fino de marto la estraro de CK eldonu stencile nomaron de la bulgara esperantistaro kun adresoj, laŭ distriktoj, por helpi la kontakton inter la societoj, aktivuloj kaj izolaj esperantistoj.

Disponante tian nomaron la estraro faru detalan planon pri kontaktigo de societoj kaj aktivuloj kun izolaj esperantistoj kaj konkrete komisiu fondadon de novaj esperantistaj societoj.

e) Daŭrigi la vizitadon al la lokaj societoj, precipe al la malpli viglaj, por aktivigi kaj plivigligi ilin kaj por establi bonan kompletan organizan disciplinon.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

DECIDOJ

de la tria Plenkunsido de CK de BEA pri 34-a Bulgara esperantista kongreso

La plenkunsido de CK de BEA konfirmas la decidon de la estraro pri okazigo de la 34-a Bulgara esperantista kongreso en Târnovo la 10-an kaj la 11-an de julio 1960 jaro kun jena tagordo:

1. Raporto de CK de BEA kaj de KK pri la agado de la asocio dum 1958—60 jaro.

2. Elekto de CK kaj de KK.

Programo de la kongreso:

9. VII. — 20 h. Interkona vespero

10. VII. — 8.30 h. Solena malfermo de la kongreso kaj unua laborkunsido

14 h. Trarigardo de la vidindaĵoj

16.30 h. Dua laborkunsido

20.30 h. Prezento de Esperanto-teatraĵo

11. VII. — 8 h. Kunsido de la junulara sekcio (ĝis tagmezo)

8.30 h. Laborkunsido

14 h. Kunsidoj de la sekcioj: ĵurnalista, fervojista, instruista, kuracista, poŝtista, blindula.

17 h. Laborkunsido

19 h. Fermo de la kongreso

Tuturba mitingo de la paco

12. VII. Tuttaga ekskurso

Kongreskotizo: ĝis 1-a de majo — 10 levoj, ĝis 15-a de junio 15 levoj, post tiu dato — 20 lv.

Oni organizu dum la tagoj de la kongreso vartejon por la infanoj de la kongresanoj.

Ni invitu por la kongreso kiel gastojn de BEA po unu reprezentanton de la gravaj naciaj organizaĵoj, reprezentanton de UEA kaj po du reprezentantojn el la socialismaj kaj la balkanaj landoj. Ni invitu aparte kelkajn elstarajn esperantistojn el eksterlando. Iujn el la gastoj ni povas utiligi kiel prelegantojn.

La estraro proponu al la sovetaj kaj rumanaj esperantistoj organizi pere de siaj turismaj entreprenoj amasan ekskurson al Târnovo okaze de nia 34-a. Kun iuj socialismaj landoj CK organizu reciprokan sendevizan gastadon.

f) Kontroli senĉese la kolekta-
don de monrimedoj por konstruo de
Esperanto-domo en Sofio kaj helpi la
societajn estrarojn en tiu kampanjo.

3. Komisias al la Estraro de CK
de BEA, pere de la kulturkleriga fako
kaj la ĵurnalista sekcio prizorgi la
kompletan plenumon de la rezolucio
de la dua plenkunsido konekse kun
la partopreno de la bulgara esperan-

tistaro en la tutpopola movado por
plenumo de la tria nacia ekonomia
plano en reduktitaj templimoj. La
menciita fako kaj la ĵurnalista sek-
cio devas plenumi sian patriotan kaj
esperantistan devon, kontribuante ke
la grandiozajn atingaĵojn de nia po-
polo en la socialisma konstruado ni
konigu al la tutmonda esperantis-
taro kaj per ĝi al la mondo entute.

DECIDOJ

de la tria plenkunsido de CK de BEA okazinta
je la 31. I. 1960 konekse kun la raporto de
Ivan Sarafov „Esperanto en la lernejoj“

1. CK de BEA daŭrigu la insistajn
paŝojn ĉe la Ministerio de la klerigo
kaj kulturo por akcepto kaj enkondu-
ko de lernado de Esperanto en la stu-
drondetojn de la mezlernejoj kaj fa-
kultative en la filologian fakultaton
de la Universitato.

2. CK de BEA komencu publikigi
metodikajn materialojn por pliboni-
go de la lerneja instruado de la
lingvo.

3. Dum la 34-a kongreso de la bul-
garaj esperantistoj en Târnovo CK de
BEA okazigu ekzamenon por bona
posedo de la lingvo kaj por instru-
kapablo de la lingvo.

4. CK de BEA gratulas la Centran
domon de la instruisto ĉe la CK de
la Sindikato de la laboristoj de kleri-
go kaj kulturo pri la malfermo de
kurso por instruistoj (kursgvidanto
Sim. Ĥesapĉiev) ĉe la Domo. CK de
BEA kun la helpo de CK de la Sindi-

kato de la laboristoj de klerigo kaj
kulturo ankaŭ estonte organizu si-
milajn kursojn por instruistoj (ekz.
por somerumantoj dum la somero
laŭeble kun la partopreno de fremd-
landaj instruistoj), kursojn por kurs-
gvidantoj, konferencon kun prelegoj
kaj interŝanĝo de pedagogia sperto
konekse kun la instruado de la lingvo
en la lernejoj.

5. CK de BEA organizu konkurson
inter la bulgaraj esperantistoj por
verkado de lernolibro por infanoj
(lerneja kurso). La kondiĉoj de la
konkurso oni publikigu en «Bulgara
esperantisto», «Nuntempa Bulgario»
kaj per speciala cirkulero.

6. CK de BEA aprobas la laboron
de la gelernanta gazeto «Grajnoj en
vento» eldonata en vil. Polski Trâm-
beŝ, distrikto de Târnovo, kaj reko-
mendas al la instruistoj — esperan-
tistoj kunlabori al ĝi.

Ĉu ekzistas ankoraŭ esperantistoj, kiuj ne legas nian orga-
non «Bulgara esperantisto»? Tuj abonigu ilin! Abonigu viajn
eksterlandajn gekorespondantojn! Sekvu la ekzemplon de D. Iva-
nov el Plovdiv!

GRAVA DOKUMENTO

La Centra intersindikata konsilantaro en Bulgario eldonis instrukcion pri organizo de Esperanto-kursoj en fabrikoj kaj oficejoj. Interalie oni skribas:

Vastajn eblecojn por korespondado kun eksterlando donas al ni internacia lingvo Esperanto. La simpla gramatiko de tiu ĉi lingvo donas eblecon al ĉiu scivolema homo el-lerni ĝin en mallonga tempo kaj utiligi ĝin por siaj internaciaj kontaktoj. Tio ĉi rilatas precipe al la laboristoj, por kiuj Esperanto povas estiĝi dua lingvo post la gepatra.

Poste oni donas praktikajn kaj detalajn instrukciojn al la fabrikaj kaj oficejaj sindikataj komitatoj pri helpo kaj subteno de la organizotaj Esperanto-kursoj.

La societaj estraroj devas utiligi tiun okazon kaj kontaktiĝi kun la sindikataj komitatoj de la pli grandaj entreprenoj por intertrakti la demandon por propagando de Esperanto kaj por organizo de kursoj.

Ĉi sube ni represas la originalon de la instrukcio.

ЦЕНТРАЛЕН СЪВЕТ НА ПРОФЕСИОНАЛНИТЕ СЪЮЗИ В БЪЛГАРИЯ ЦЕНТРАЛЕН КОМИТЕТ НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ ДО ЦЕНТРАЛНИТЕ КОМИТЕТИ НА ПРОФСЪЮЗИТЕ, ОКРЪЖ- НИТЕ СЪВЕТИ НА ПРОФСЪЮЗИТЕ, ПРОФДРУЖЕСТВАТА И ПРОФКОМИТЕТИТЕ

У К А З А Н И Е

за подготовка и откриване на курсове по ЕСПЕРАНТО през учебната 1959—1960 год.

През тази година ние чествувахме петнадесет години от освобождението на нашата страна от монархо-фашистко и капиталистическо робство. За тези петнадесет години нашата народно-демократична република от изостанала земеделска страна се превърна в индустрилно-земеделска с едро социалистическо машинизирано земеделско стопанство. Ние постигнахме големи успехи в областта на народното образование, здравеопазването, общественото осигуряване и пр. Тези големи наши успехи ние трябва да направим достояние на всички честни хора по света, на всички борещи се за мир и дружба между народите.

Широки възможности за кореспондиране с чужбина ни дава и международният език ЕСПЕРАНТО. Опростената граматика на този език дава възможност на всеки любознателен човек да го изучи за кратко време и да го използва за своите международни връзки. Особено това се отнася за работниците, за които Есперанто може да стане втори език след матерния.

Курсовете за изучаване на международния език Есперанто се откриват и ръководят от Българския Есперантски

съюз — чрез многобройните есперантски дружества в страната.

Желателно е профсъюзните ръководства в предприятията и учрежденията да предоставят за ползуване от работниците желаещи да учат международния език Есперанто изградената вече за курсовете по руски език материална база — учебни стаи, черни дъски и други помагала и окажат съдействие за реда на ползуването им.

През учебната 1959 — 1960 година Българският есперантски съюз организира курсове за начинаещи. В тези курсове Есперанто се овладява до степен курсистите да могат да си служат с езика във всекидневния живот.

Освен тях С. П. „Всестранни услуги“ при Софийски градски народен съвет открива задочни кореспондентски курсове за начинаещи и напреднали.

При откриването на курсовете в предприятията и учрежденията трябва да се има предвид следното:

1. Учебните звена да не са по-големи от 20 души.

2. В едно и също звено се включват курсисти, които имат приблизително еднаква образователна подготовка.

3. В курсовете да се включват работници и служители с еднакво работно време, като в един и същи курс не участвуват работещи в различни смени.

4. В предприятията и учрежденията предварително се подготвят списъците на желаещите да посещават курса. Всеки курсист заплаща еднократна такса от 40 лева в профкомитета, който от своя страна предава сумите в местното есперантско дружество.

ЦЕНТРАЛЕН КОМИТЕТ НА
БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ
СЪЮЗ —
СЕКРЕТАР: (п) Кр. Каруцин

Откриването на курсовете трябва да започне от м. януари. Желателно е при откриването да се поканят представители на местното есперантско дружество.

Времетраенето на курса, броят на седмичните занимания и продължителността на лекциите се определя на мястото според възможностите и условията.

ЦЕНТРАЛЕН СЪВЕТ НА
ПРОФЕСИОНАЛНИТЕ СЪЮЗИ
В БЪЛГАРИЯ —
СЕКРЕТАР: (п) Н. Алексиев

NOVAJ SOCIETOJ

(fonditaj dum 1959)

21. Vilažo Trajanovo, distr. de Stara Zagora, societo «Espero» (fondita la 18-an de junio) kun 6 membroj.

22. Vilažo Mâglij, distr. de Stara Zagora, societo «Septembra stelo» (fondita la 7-an de oktobro) kun 19 membroj
(fonditaj dum 1960 jaro)

1. Urbo Mezdra, societo «Nikola Vapcarov» (fondita la 8-an de januaro) kun 22 membroj.

2. Urbo Breznik, societo «Aŭroro de komunismo» (fondita la 12-an de januaro) kun 20 membroj.

Societo „M. Gorkij“ — Sofio

LA JARKUNVENO

Sofio. Je la 25-a de januaro k. j. okazis la jara kunveno de sofia E-societo «M. Gorkij». Ĉeestis ĉirkaŭ 120 gesocietanoj. La prezidanto de la societo N. Nikolov faris raporton pri la nuna stato de la societo, pri ĝiaj atingoj kaj revuis la laboron de la estraro. La societo atingis la kontrolan ciferon starigitan de CK de BEA — 400 membrojn. Neniam en sia longjara historio la societo atingis tian sukceson. Krom la bona laboro de la societa estraro tre grava parto havas la laboron de la aktivuloj kiel Asen Grigorov, kiu persone kotizigis 120 samideanojn, D. Dobrev, M. Ĥristova, Jordan Ĉaljovski k. a.

La societo jam havas nomaron de ĉiuj troveblaj esperantistoj en Sofio. Ĉiuj estantaj kaj estintaj membroj de la societo estas ĉirkaŭ 1800. La praktiko montris, ke devas esti nova strukturo de la societo. En

ĉiuj 6 distriktoj de la ĉefurbo la societa estraro kreos helpantajn estraranojn, kiuj kolektos la membrokotizon kaj organizos la aranĝojn de la societo.

Por la plibonigo de la organiza laboro la societa estraro fondos en iuj fabrikoj, oficejoj, kie estas pli ol 5 esperantistoj E-grupojn. Jam estas organizitaj tiaj grupoj en kulturdomo «Kiril kaj Metodij», la teatro «Trudov Front», la Nacia opero, la ŝtata plana komisiono k. t. p.

Specialan atenton la estraro direktis alla novaj kursoj. Estis organizitaj 14 kursoj en tiu ĉi lernjaro kaj la societo preparas ankoraŭ 10. Tiurilate tre bona kaj fruktodona estis la laboro de St. Moraresku, gvidanto de tiu ĉi fako. Grava manko estis la nesufiĉa laboro inter la novaj kursanoj, la estraro ne invitis ilin en niajn kunvenojn.

La societo havas novan pli grandan salonon, en kiu kunvenas regule ĉiulunde. Aparte kunvenas la junuloj, kiuj ankaŭ tre vigle laboras. En la kunvenoj estis aŭskultataj multaj bonegaj prelegoj de At. Atanasov (Ada), At. Lakov, K. Vâlev, V. Oljanov k. a. Iuj el ili estos stencilitaj.

Tre solene festis la societanoj la Zamenhofan jubilean datrevenon, aktive partoprenante en ĉiuj aranĝoj de la societo.

La societo havas sian kantgrupon en kiu partoprenas 30 personoj kaj organizis teatran grupon «Flamo» sub la gvido de artistoj de nia E-teatro.

Por la ĝustatempa informo de ĉiuj sofiaj esperantistoj por iuj gravaj iniciatoj la estraro komencis eldoni la informan bultenon «Esperanta Sofio». Ĝi aperados 3-foje dum la jaro.

La raportinto taksis la laboron de la estraranoj.

Grava manko de la estraro estas ke la membroj ne ĉiam laboris kune, ke plimulto

de la laboro restis sur la dorso de la prezidanto. La nova estraro devas tiel distribui sian laboron, ke ĉiu membro kontribuu en la komuna agado. La kunveno akceptis decidojn por plibonigo de la societa vivo, por ĝia plivigligo kaj plivariigo. Ili trovis lokon en la rezolucio.

La kunveno elektis novan esraron en kiu partoprenas aktivaj kamaradoj. Prezidanto estas elektita Canko Murgin.

La kunveno ne estis bone organizita kaj antaŭpreparita. Eble lundo ne estas la plej taŭga tago. La partoprenantoj ne diskutis vigle kaj analize kaj ilia nombro estis malgranda. La komisiono pri elekto de nova estraro ne funkciis bone, ne motivis siajn proponojn, ne esprimis rilaton al la aldonaj proponoj. La projekto-decidojn oni preparis en la lasta momento kaj sen komisiono.

Ni bondeziras al la societo kaj ĝia nova estraro fruktodonan laboron kaj plurajn sukcesojn dum la nova jaro.

Delka Ĉolakova

INTERESAJ RAPORTOJ

Dum la regulaj semajnaj kunvenoj la vivo de la sofiaj esperantistoj estas sufiĉe riĉa je interesaj eventoj.

Asistanto pri geografio Canko Murgin raportis pri sia vojaĝo en Anglio pere de Esperanto. Dank' al siaj korespondantoj en la ekonomia superlernejo li sukcesis viziti pli ol dek urbojn, universitatojn, partopreni kunvenojn kaj sciencajn konferencojn en tiu tre malfacile penetrebla de eksterlandanoj lando. Tre amike renkontita en la anglaj esperantistaj medioj, li ricevis pli ol 40 invitojn por vizitado de diversaj urbaj E-societoj en diversaj partoj de la lando, kion li nature ne sukcesis fari. Lia senpera kontakto kun la lando, pri kiu li instruas la studentojn, donis al li grandan avantaĝon por lia profesio.

Interesan raporton faris inĝeniero Stefan Masârov pri la intensa laboro de unu speciala komitato en tutmonda skalo pri la kom-

para lingvistiko. Pli ol 20 bone konataj lingvaj specialistoj, profesoroj kaj lingvaj akademianoj, pacience esploris la kvalitojn de la diversaj naciaj kaj artefaritaj lingvoj rilate al la elekto de la plej taŭga internacia lingvo. Oni volas meti flanken la emocian vidpunkton, tiel ofte kunligita kun la ago de Zamenhof. La homaro bezonas la enkondukon de internacia lingvo kaj eble la opinio de tiu komitato helpas por la indiko de tia internacia lingvo. Ni, la esperantistoj povas esti trankvilaj, ĉar laŭ nia profunda konvinko tiu-ĉi lingvo povas esti nur Esperanto.

La kantista grupo ĉe la sofia societo «Maksim Gorkij» jam komencis siajn ekzercojn. Oni trovis ejon por tio kaj oni elektis la repertuaron. Baldaŭ nia bela Esperanta kanto denove eksonos. Eble ekkantos ankaŭ ĉiuj samideanoj ĉe niaj kunvenoj.

Stefan Kadiev

LA JUNAJ KANTISTINOJ LERNAS ESPERANTON

Sesdek junulinoj kantistinoj entuziasme lernas Esperanton. Baldaŭ ni havos la plezuron aŭskulti belartan kantprogramon en Esperanto. Kantante ili disvastigos la elegantecon kaj belsonorecon de Esperanto. Sesdek junaj ardoplenaj koroj estas pretaj doni sian amdonacon al la Esperanta mondo. Certe, ili povos fari tion ĉar ili jam montris sian kapablecon.

La ĥoro de la Sofiaj knabinoj ĉe legejo «Slavjanska beseda» havas mallongan sed riĉan historion. Kreita en 1953 dum la kelkjara ekzisto la ĥoro sukcese prezentis nian muzikan kulturon ankaŭ sur internacia skalo. Ĝi partoprenis kelkajn junularajn festivalojn, kie gajnis grandajn premiojn.

La repertuaro de la ĥoro estas tre abunda

kaj riĉa. Ĝi enhavas kantojn de bulgaraj kaj alilandaj aŭtoroj.

Por la rapida disvolvo de la ĥoro multe helpis ĝiaj lertaj gvidantoj k-doĵ B. Boĉev kaj D. Gonĉarov. Nune la ĥoro laboras sub la gvidado de la juna muzikisto G. Robev.

Rigardante la ĥoron, ĝian ĉarman junecon

kaj aŭskultante la belartan plenumon de la kantoj, oni estas forte emociita kaj korusita.

Estas tre grava atingajo ke tiu lerta arta kolektivo baldaŭ ekkantos ankaŭ esperantlingve.

V. Dimitrova

Breznik. Ekde decembro p. j. en nia meza lernejo estas malfermitaj kursoj de Esperanto. La entuziasmo de la lernantoj estas granda kaj iuj komencis eĉ korespondi. Ĉe ĉiu klaso funkcias po unu kurso, do entute kvar kursoj por lernantoj. Funkcias ankaŭ aparta kurso por la instruistoj. La kursojn gvidas la instruisto pri matematiko s-ano T. Tonkov laŭ la rekta metodo.

Ŝ. Kuzev

La redakcio laŭdas nian konatan s-anon T. Tonkov — estinta membro de la sofia E-societo, kiu alvenante en Breznik aktive eklaboris por disvastigo de Esperanto inter la gejunuloj.

Jen estas modelo por ĉiuj studentoj esperantistoj, kiuj post fino de ilia studado for-

veturas labori en diversaj lokoj en la provinco.

Kazanlâk. Eĉ la lastaj tagoj de decembro p. j. estis honoraj al nia Esperanto-movado.

La prezidanto de esp. societo «Roza valo» en Kazanlâk D. Martinov vizitis je la 27-a de decembro 1959 j. vilaĝon Gabarevo kaj fondis esp. societon kun 6 membroj. La societo prenis la nomon de nia majstro «Zamenhof».

Oni elektis kiel prezidanton Stefanka Nestorova. Estas favoraj kondiĉoj por 15-20 gekursanoj.

Ĉe ni estas jam ankoraŭ unu esp. fenestro al la vasta mondo.

Andrej Pânĉev

SINDONA LABORO

Samideanoj,

En 1959 jaro mi sukcesis varbi multajn novajn kaj malnovajn abonantojn de nia kara revuo «Bulgara esperantisto». La CK de BEA malkaŝis tion sur la paĝoj de nia organo kaj mi flatita de tiu atento promesis dum 1960 jaro plivigli mian agadon tiurilate kaj enkasigi plurajn membrokotizojn kaj abonojn.

Eble kelkaj linioj pri la metodo de mia agado estus utilaj por la esperantistoj kaj aktivuloj de la movado en aliaj lokoj kaj helpus ilian laboron.

Do kiel mi agas?

Je ĉiu hazarda renkonto kun miaj konataj samideanoj mi ne hezitas memori al ili ke jam estas tempo pagi sian membrokotizon. La unua invito malofte estas sukcesa, sed per pacienca ripetado mi finfine sukcesis enkasigi ĉiujn ŝuldojn. Mi vizitadis la esperantistojn ankaŭ en iliaj propraj hejmoj, kie preskaŭ en multaj okazoj mankas ĉu la samideano mem, ĉu lia mono. Mi ne koleras. Mi prenas noton kiam li (ŝi) estos hejme kaj kiam posedos la necesan monon. Mi ri-

petas miajn vizitojn ĝis kiam fine la mono eniras la societan kason. Plej grave estas ne perdi paciencon.

Jen estas la rezultoj de mia laboro:

69 membrokotizoj kaj 47 abonoj por «Bulgara esperantisto» dum 1959 jaro kaj 21 kotizoj kaj 51 abonoj por la gazeto dum 1960. Mi disvendis ĝis nun ankaŭ 90 brikojn por la E-domo.

Dum la nova 1960 jaro kaj okaze de la 34-a Bulgara E-kongreso mi daŭrigos mian modestan laboron por disvastigo de nia movado.

Via: D. Ivanov

La redakcio gratulas s-anon Ivanov pri lia abnegacia laboro kaj dankas lin pri lia intereso letero.

Samideano M. Ivanov el vilaĝo Ĵeleznica, distr. Sofia, instruisto, nun pensiulo, vizitis dekon da vilaĝoj en Sofia kaj Dimitrova distriktoj. Malgraŭ la malfavora vetero li apostole vizitadis la vilaĝojn kaj disvendadis esperantajojn. En iuj lokoj li sukcesis organizi kunvenojn.

Ni gratulas la samideanon pri lia sindona laboro.

NOVA ETAPO EN NIA ORGANIZA AGADO

Sofia esperantista societo «M. Gorkij» por unua fojo en sia multjara historio en 1959 havas 400 membrojn. Ili loĝas en la ses distriktoj de la urbo kaj tio ege malhelpas la agadon de la societo. La societa estraro pro la multnombra kaj dissemita en la tuta urbo membraro ne havas la fizikan eblecon havi personan kontakton kun ĉiu membro, doni al ĉiuj konkretajn taskojn kaj ankaŭ kontroli ĉu oni plenumis ilin. Iom post iom ĉiuj estraranoj komprenis, ke la agado de la societo ne povas plu kreski kaj ĝia organiza stato ne pliboniĝos, se ĝi ne trovas eblecon komisi societan laboron al la plimulto de la anaro. En 1959 estis decidite, ke oni plenumu parton de la societa agado en la kadroj de la distriktoj kaj pri la agado tie zorgu mem la loĝantaj en la koncerna distrikto geesperantistoj. Post ellaboro de nomaroj de niaj membroj laŭ distriktoj ni kunvokis distriktajn kunvenojn. En ili post klarigo de la taskoj, kiujn oni devas plenumi estis elektitaj distriktaj estraroj. En la estraroj eniris gesamideanoj, kiuj estas fervoraj, entuziasmaj kaj havantaj organizan sperton. La estraranoj kaj la membroj promesis vigle labori por nia afero en sia distrikto.

Ĝis la pasinta jaro nia societo havis nur junularan grupon, kiu aktive laboras. En multaj uzinoj, fabrikoj, oficejoj k. s. estas geesperantistoj, sed ili ne estis organizitaj tie, kie ili laboras. Konekse kun la decido de la dua plenkunsido de CK de BEA pri formigo de grupoj, la societa estraro decidis fondi kelkajn grupojn, kie estas bonaj kondiĉoj. Post akiro de sperto tiurilate ni organizu grupojn ĉie, kie estas ebleco. Jam ni havas grupojn en teatro «Trudov Front», en la Ŝtata plana komisiono, ĉe kulturdomo «Kiril kaj Metodij» k. a. La grupoj gvidataj de entuziasmaj niaj membroj montris

grandan aktivecon. Estis organizitaj kursoj, parolantaj rondoj, oni eldonis murgazetojn k. s. La fondo de grupo en kvartalo «Moderno predgradie» ebligis la organizon de Esperanto-kurso kaj Zamenhofa kunveno en tiu ĉi fora de la urba centro kvartalo. La praktiko montris al ni ke la organizo de Esperanto-grupoj en laborlokoj, kie estas minimume kvin esperantistoj estas celkonforma kaj necesa. Per la formo de tiaj grupoj nia societo akiras avantaĝojn, kiujn ni ne povas akiri se ili ne ekzistus. Temas pri senpaga utiligo de ĉambroj kaj salonoj por kunsidoj, kunvenoj, amuzvesperoj, kursoj, pri subvencio fare de la entrepreno aŭ de la sindikata societo k. a.

Iuj esperantistoj esprimas opinion, ke la distrikta kaj grupa agado provokos separatismen kaj bremsos la ĝeneralan agadon de la societo. Tiaj opinioj ne estas pravaj, ĉar la agado en la distriktoj kaj en la grupoj konsistas nur el propagando de Esperanto, organizo de kursoj kaj kolektado de la membrokotizo kaj abonoj por gazetoj. Distriktajn kaj grupajn kunvenojn oni aranĝas laŭ neceso por solvo de la supre menciitaj taskoj. Tiamaniere la ĝeneralaj societaj taskoj — kunvenoj, ekskursoj, kolektiva vizito de teatro kaj kinejo, eĉ estos pli bone vizitataj, ĉar la distriktaj kaj grupaj estraroj ankaŭ propagandos ilin.

La societa estraro en 1960 devas bone organizi la distriktan kaj la grupan laboron. Ĝi devas havi konstantan kontakton kun la estraroj de la distriktoj kaj la grupoj, kaj ĝustatempe instrukcii kaj helpi ilin. De la bona plenumo de tiuj ĉi taskoj dependas, ĉu nia societo disvolvos pli aktivan agadon kaj ĉu nia membraro duobliĝos.

Nik. Nikolov

LA REZULTO DE LA BELARTA KONKURSO

En la komenco de la pasinta jaro estis anoncita konkurso okaze de la Zamenhofa jaro pri verko je temoj: Zamenhof, Esperanto kaj Esperanto-movado.

Estas ricevitaĵ 11 konkursaĵoj: 10 versaĵoj — 6 Esperanto-lingvaj kaj 4 bulgarlingvaj kaj 1 prozaĵo Esperanto-lingva.

La enhavo kaj la formo de la konkursaĵoj ne estas je sufiĉe alta nivelo. La konkurintoj ne sufiĉe bone pripentris la modestan majestecon de nia Majstro kaj ne respegulis plene la ideojn kaj emociojn, kiuj impulsas la esperantistaron en ties batalo por la disvastigo de la lingvo kaj por la triumfo de la paco kaj kunfratiĝo inter la popoloj. La formo de la konkursaĵoj ne estas ĉiam sufiĉe trafa kaj korekta.

La redakta komitato decidis:

La unua kaj la dua premioj ne estas prijuĝataj.

La tria premio estas prijuĝata al:

Ivan Stojanov Kolarov el Sofio por la bulgarlingvaj versaĵoj **ZELENATA ZVEZDA**
(La verda stelo) kaj **ESPERANTO**;

Simeon Ĉirpanliev el Sofio por la Esperanto-lingva poemo **LA LINGVO DE LA PACO**;

Ivan Zahariev Ĵelev el kazanlâk por la bulgarlingva poemo **STOLETIE** (Jarcento).

La redakta komitato gratulas la premiitojn kaj rekomendas al ĉiuj verkemuloj:
Legu kaj pristudu enprofundiĝinte la verkojn de nia Majstro kaj de la elstaraj Esperanto-
verkistoj. Laboru pli obstine kaj zorgeme sur viaj verkoj, ĉar nia lingvo estas perfekta
esprimilo de la ideoj, emocioj kaj sopiroj, kiuj agitas la popolojn kaj la apartan homon en
ties internacia vivo kaj interrilatoj.

Ni publikigas la premiitajn verkojn.

СТОЛЕТИЕ

Летиме днес в небето необятно
и стават наши чудните звезди...
Дошли са дни — сърцето ни крилато
към нови светове да полети.

Преградите, жестоките прегради,
що пречека на похода напред
порутихме ги с царските палати
и няма край човешкият полет.

Земята ни до вчера тѝй печална,
окъпана от горестни сълзи
на мрака чер оковите разкъса
и ражда нови светли бѝднини.

Стопява се човшеката омраза,
подават си народите ръка —
че братството жадувано, мечтано
покълна в милионите сѝрца.

Историята бурна — величава
записа и вѝв Полша преди век
плесница на човешката омраза
сѝс раждането на велик човек.

... А тук било е тюрма необятна,
и мрак, и безпределна тѝпота,
и бог, и господар, и милиони роби.
и оскотяла дрипава тѝлпа.

... И ето в Бялисток звезда сияйна
разсича мрака с огнена любов...
В такава ноц човек човека ражда —
човекѝт Лазар Лудвиг Земенхоф!

Кой може колелото на прогреса
да спре сѝс своята дива тѝпота?!...
Такава сила няма и не може
леговище да има на света!

Като вѝлните на поток планински
годините потекли в буен бѝг
между скалите и от тѝмни бездни —
запљискали се те от бѝг на бѝг...

И все напред... нататѝк в равнината —
там дето днеска блика нов живот,
там дето комунизѝмѝт се ражда
под слѝнчевия ведѝр небосвод.

Там дето вѝв борбата величава
между омразата и любовта
езикѝт ЕСПЕРАНТО става
орѝжие в труящата рѝка!

Езикѝт Есперанто, скѝпа рожба,
безценен дар за мирния народ,
начало светло на велико братство —
начало на единния народ!

О, вие братя и сестри... другари...
о, всички вие хора на труда —
на този ден столетен нека кажем
на Лазар Лудвиг Земенхоф — хвала!

Да преизпѝлниме сѝрцата си сѝс обич,
да снемем шапките пред тоз светец
и с рози нежни, с рози най-уханни
за него да сплетеме тук венец...

Сега над Бялисток е светѝл празник —
тук няма вече бог и господар —
че тука хората са сѝщи братя,
човекѝт за човека е другар.

И нека да запеем химни нежни
през този прѝв столетен ден рожден
и с химните си ний велика слава
на Заменхоф задружно отдадем!...

Иван Захариев Желев

LA LINGVO DE LA PACO

Ho, sankta lingvo de la paco!
La ondo de parolo via
traflugas la senliman spacon
kaj kiel kant' internacia
sonoras sub la firmamentoj
de l' kvin terglobaj kontinentoj.

Vi dormis dum miljara tempo
en la lulilo de la lingvoj
kaj dum la dormo vi atendis
kiel la dormanta belulino
la fortan Zamenhof-genion
vin veki por la historio.

Ĝi vekis vin, kaj la sonoro
de via nova, paca liro
ekkantis al la sangaj koroj
per la bloveto de l'zefiro:
— Alvenas sankta harmonio
al la homara familio.

La parolantaj Esperanton
malbenis la militon sangan.
Ja kiu lingvo ekzistanta
posedas tian altan rangon,
ke povas diri por si tion:
— Mi kantis por la paco ĉiam!

Post sepdekjara pacbatalo
vi brilas riĉa kaj admira,
malmola kiel sveda ŝtalo,
kantanta kiel greka liro,
kaj ĝusta kiel la raketo
surlunigita de l'Sovetoj.
En la epoko de l'raketoj
flugantaj tra la kosma spaco
por ligi frate la planedojn,

ЕСПЕРАНТО

Създаде те един човешки гений,
но вражи глас предрече смърт,
че уж си нямал ти земя рождена
и бил безцелен твоят път.

Работникът ти даде длан корава
и тръгна ти със него в крак;
холандеца с индус побратимяваш,
сближаваш негъра с руснак.

Поетът пламенно сърце ти даде —
ти с пулса на века трептиш:
идеите на Ленин, вечно млади,
посяваш в хорските души. . . .

Столетник, с гълъб бял на раменете,
кръстосваш всеки паралел:
родина ти е цялата планета,
мирът е твоя свята цел!

Иван Коларов

vi sankta lingvo de la paco,
triumfe levas vian stelon
saluti teron kaj ĉielon.

Sub la flirtanta verda flago
vi benas teran la homaron,
iranta la unuan tagon
de l' komencinta kosma jaro —
jaro de scienco, de frateco,
de monda lingva egaleco.

La blanka paco jen deklaris
militon kontraŭ la milito.
Sovetunio jam signalis
sed ne per bomboj malbenitaj,
ne! — per kolomboj fluggirlandaj
la malarmitigon de la landoj.

Nun per la tuthomara volo
al ĉiuj lingvoj vi deklaras:
— Vi estas lingvoj de l'popoloj,
mi estas lingvo de l'homaro,
mi, paca lingvo Esperanto,
inter la lingvoj diamanto.

Simeon Ĉirpanliev

ЗЕЛЕНАТА ЗВЕЗДА

Отрядът отстъпи в Балкана —
залегнал стрелец го прикри
Здрачи се. Безшумно той стана,
потта от челото изтри.

Но парна го нещо в сърцето
и хванал се с вик за гръдта,
притисна ревера, където
искреше зелена звезда. . .

На черната лента, що мигом
орловия поглед стъмни,
прочете той: „Kara amiko“
и спомни студентските дни.

със ремсови тайни доклади,
и зърна пак онзи поляк,
що нявга значката му даде,
и чу хитлеристкия грак,

надвиснал над люлките детски,
и гневно на бой полетя.
Но лентата секна. . . Боецът
се снижа безжизнен в пръстта. . .

А там на гръдта, осветена
от бледните лунни зари,
звездичката — окървавена —
с червени лъчи заискри!

Иван Коларов

Trifon N. Ĥristovski

(okaze de la 55-a datreveno de lia naskiĝo)

Trifon N. Ĥristovski, talenta ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto, naskiĝis je la 24-a de januaro 1905 en vilaĝo Radotina, regiono de Botevgrad, mortis la 16-an de junio 1944.

Ankoraŭ en vindoj, kiel 6-monata infano, Ĥristovski suferis pro infana paralizo, liaj piedoj kaj dekstra brako estis atrofitaĵ. Li kreskis sub la zorgoj de sia patrino kaj avino en treege malriĉa situacio. Kiam la kamaradoj de Trifon komencis viziti la lernejon, lia avo portis lin surdorse (ĉar li ne povis moviĝi) al la lernejo en daŭro de kelkaj monatoj. La avo estis kaduka, krom tio li devis zorgi pri la vivrimedoj, kaj li laciĝis porti ĉiu matene la knabon al la lernejo. Krom tio ili diris al si — pro kio estas necesa kleriĝo de tia kripla infano. Kaj plu Trifon ne vidis la lernejon. Sed tiuj kelkaj monatoj estis sufiĉaj entuziasmi la infanon al memkleriĝo. Li plej diligente reskribis la lecionojn de siaj kamaradoj hejme. Li aŭtodidakte lernis skribi kaj legi.

Tiu ĉi vivanta kadavro kun mirakla volo kaj ĉe ege pezaj kondiĉoj de vivo memkleriĝis dum sia junula periodo kaj poste. Lia heroaĵo vekis miron. Li mem, posedanta plej malgrandajn rimedojn kaj eblecojn, sen ies helpo, akiris vastan kleriĝon: plenajn geografiajn konojn pri la mondo, konojn de ekonomio, sociologio, historio kaj medicino.

Kun la helpo de iu instruisto en la vilaĝo en 1927 Trifon lernis la internacian lingvon Esperanto per neesprimebla diligenteco kaj sindonemo. En la lingvo li vidis la malfermitan fenestron al la konoj, al la vasta mondo. Per ĝi li akiris politikajn sciojn kaj sin fordonis al literatura verkado. Per la helpo de Esperanto Trifon komprenis la justan batalon de la Bulgara komunista partio por pli feliĉa vivo. Li estis ĝia membro kaj sindona posteulo. Li kreis al si kontakton kun la reprezentantoj de la progresema movado en Anglio, Pollando, Francio, Usono, Svislando, Japanio, Nederlando k. a. Sed plej forta kaj fruktodona estis la kontakto kun la sovetaj esperantistoj kaj kun la batalanta kontraŭ la japana imperiismo ĉina popolo.

Emociaj estis la batalpretaĵoj korespondantoj de liaj amikoj. Tur Nizon, korespondanto



el la regiono de Balta maro, Wladislaw Lablowski el Pollando, Maria van Essen kaj Ate Wan Kampen el «Internaciisto» — Nederlando k. a.

En la rubriko «Miaj internaciaj amikoj» Trifon Ĥristovski informis nian popolon de la kolumnoj de ĵurnalo «Zarja» kaj aliaj progresemaj gazetoj pri la bataloj de la laborhomoj en la kapitalisma mondo.

En la laborista kaj progresema fremdlanda gazetaro li publikigis korespondantojn kaj skizojn pri Bulgario. Ĥristovski konatigis la progreseman kaj kulturen socion pri la strategio de nia vilaĝo ĉe la kapitalismaj kondiĉoj, pri la amo de la popolo al la laboro kaj libero, pri la viktimoj, kiujn la Bulgara komunista partio donis dum la faŝisma juko. La diplomatoj de la kapitalisma Bulgario ne faris tiom pri la konatigo de nia lando kun fremdlando, kiom Ĥristovski kontribuis ĉi rilate per la internacia lingvo Esperanto.

La duono de la korespondantoj ricevitaj en la regiono de Botevgrad antaŭ la 9-a de septembro 1944, estis direktita al la malalta dometo en vilaĝo Radotina, kie pulsadis la granda homa koro de la komunisto Ĥristovski. Ĉiujn siajn fortojn la bulgara esperantisto disvolvis celdirekte ĉe tre alta spirito kaj kun la kompreno, ke la ĉefajo estas «ne nur ke oni devas vivi, sed oni vivu sencplene», ke oni devas batali por la laborista klaso, kaj kiam mankas brakoj por tio, oni batalu per la plumo kaj per la justa parolo de la partio.

La multaj malsanoj ĉe Trifon forprenis ĉiujn liajn ĝojojn kaj esperojn, krom la ĝojon batali kaj la esperon ke tiu batalo alkondukos ĝis venko. Kun tiu kredo, kun granda amo kaj diligenteco la aŭtodidakta esperantisto pristudis multajn volumojn da ekonomia literaturo, kolektis diversajn materialojn pri la vivo kaj verkaro de nia nacia poeto-heroo Hristo Botev, verkis kaj eldonis broŝuron pri lia heroo morto kaj libron «La problemoj de la vilaĝo». En la lasta li pritraktis la proceson de distavoligo kaj proletariigo de la bulgara vilaĝo. Tion li faris sub la formo de taglibro por la enspezoj kaj elspezoj de unu malgranda agrikultura mastrumo dum longaj jaroj, notante kaj takante objekte ĉiujn statojn, ĉiujn feliĉojn kaj malfeliĉojn, kiuj falas sur ĝi.

Hristovski verkis ankoraŭ kelkajn librojn, inter kiuj meritas esti rimarkigita lia libro pri Ĉinlando, en kiu li per mirinda majstreco priskribas la socialan staton de la ĉina popolo, la influo de la kapitalo de ekstere, kaj la aspiroj de la laborhomoj liberiĝi el la sklaveco de la kapitalo. La cenzuro ne permesis esti eldonita tiu ĉi libro. Ĉiujn materialojn pri ĝi Hristovski kolektis rekte de ĉinaj fontoj, korespondante en Esperanto kun ĉinoj.

En siaj lastaj tagoj, kiam eksentis ke proksimiĝas lia fino, antaŭirante la morton, Hristovski verkis sian aŭtobiografian romanon «Mia vivo», kiun oni legas je unu spiro. La stilo estas mirinde figura kaj arta. En «Mia vivo» arde brilas la originala talento de unu granda nia verkisto. Sufiĉe grandan lokon en tiu ĉi libro la aŭtoro apartigas al sia esperanta agado. La vivo de Hristovski estas brila ekzemplo de tio, kian rolon povas ludi Esperanto en la praktiko. La vivo kaj la verkaro de Trifon Hristovski tre similas al la vivo de Nikolaj Ostrovski, la granda soveta verkisto. Li kiel Ostrovski fordonis ĉiujn siajn konojn kaj fortojn en la batalo de la kuraĝaj kaj spirite fortaj homoj kontraŭ la maljustaĵoj de la vivo.

Trifon Hristovski estis unu el la gvidantoj de la revolucio en la regiono de Botevgraĉ en septembro 1923. Li estis amiko de Hristo Smirnenski, Geo Milev, Georgi Bakalov kaj multaj aliaj progresema verkistoj. Kiel komunisto en daŭro de 20 jaroj la loka reakciularo verŝis sur lin furiozan turmenton kaj persekuton.

Tamen, prizorgata de amikoj kaj homoj, kiuj povis lin kompreni, en 1940, malgraŭ la malpermeso de la aŭtoritato, Hristovski estis honorita de liaj sinceraj amikoj kune kun la loĝantaro de lia naskiĝvilaĝo.

Kiam Hristovski vidis sian finon, eksen-

tis ke lia vivo estingiĝas, li kolektis lastajn fortojn kaj skribis: «Kiom daŭros mia agonio estas nekonate. Mi akceptos la finon trankvile kaj stoike, kiel mi akceptis ĉiujn malfeliĉojn kaj maloportunaĵojn de la vivo. Ununura deziro, kiu blinde min tenas al ĝi, estas la deziro ke mi ĝisvivu la efektivigon de la granda idealo, pri kiu donis sian vivon milionoj da homoj. . . La nuna batalo estas lasta kaj decida». Per tiuj ĉi linioj finiĝis ankaŭ la vivo. Kaj tio okazis en la antaŭtago de nia liberiĝo. Sed Trifon Hristovski daŭrigas vivi kaj li servos kiel ekzemplo al la junaj generacioj per sia firma kredo en la pli belaj estontaj tagoj.

Ni devas konatiĝi kun lia vivo kaj verkaro. Lia ekzemplo brilos ĉiam antaŭ niaj okuloj, ĉar li elkreskis el la cindro. Malgraŭ ĉiuj naturaj frapoj kaj suferoj, malgraŭ la persekutoj de la reakciularo dum lia tuta vivo, li altiĝis je gvidloko en nia socia penso kaj elkreskis kiel esperanta publicisto kaj aganto.

Liaj bonaj amikoj metis sur sin noblan taskon kolekti liajn verkojn publikigitajn en dekoj da eksterlandaj esperantaj eldonoj. Li publikigis materialojn en la organo de la internacio de proletaj esperantistoj «Internaciisto», en la revuoj «Bezbojnik» en USSR, «Popola fronto» aperinta en Valencio (Hispanio), «Ĉinio hurlas» kaj «Justeco» en Ĉinlando. Poste la unua ŝanĝis sian titolon en «Heroldo de Ĉinio» kaj la dua, post la almlito de Kanton komencis aperi en Hong Kong sub la titolo «Voĉoj el Oriento». Li publikigis artikolojn ankaŭ en la revuo «Orienta kuriero» same en Ĉinlando k. a. Liaj verkaroj daŭris de 1927 ĝis 1944. Plej multajn korespondaĵojn li sendis en la antaŭtago de la Dua mondmilito. La kolektado de tiuj materialoj donos eblecon eldoni duan parton al lia romano «Mia vivo — vivo ekzemplo». Tiu ĉi socia devo povas esti plenumota nur kun la subteno de ĉiuj konatuloj, amikoj, kamaradoj de Hristovski, de la esperantistoj ĉe ni kaj en eksterlando. La redakcio uzas la okazon peti la fratajn esperantajn eldonejojn, niajn kulturajn ataŝeojn en fremdlando kaj ĉiujn samideanojn, konatojn kaj amikojn de Hristovski en Bombaj, Detroit, Moskvo, Hamburgo, Viborg, Tokio, Zagreb k. m. a. sendi liajn personajn leterojn, korespondaĵojn, skizojn kaj artikolojn al nia redakcio en Sofio.

Vasil Vasilev, Nikola Stefanov

KIO ESTAS VIA NOMO AŬ KIA ESTAS VIA NOMO?

Samideano P. Kamburov el Stara Zagora skribas al ni:

1. En la lernolibro de Andreo Ĉe — sur paĝo XII en la komenco estas skribite: «Kio estas via nomo?»

2. En la sepa eldono de la lernolibro de Ada, sur 18-a paĝo en la rubriko «Demandoj» oni legas: «Kia estas via nomo? Kia estas la nomo de via onklo?» Sur 21-a paĝo de la sama lernolibro oni legas: «Kia estas via profesio?»

Mi petas volu respondi, kiu esprimu estas pli ĝusta? Ĉar laŭ mi, se temas pri la nomo mem, oni devas uzi nek «kio» nek «kia», sed «kiu» — Kiu estas via nomo? — Ivan, Petro, Vladimir ktp.

La esprimu «Kia estas via nomo» per si mem gramatike estas bona kaj regula, sed ne logika, ĉar «Kia estas via nomo» ne koncernas la nomon mem, sed — ĝian kvaliton: Kia? — ĉu bona estas via nomo aŭ malbona; ĉu belsona aŭ ne. Ankaŭ pri profesio oni devas demandi: Kiu estas via profesio ktp.

«Kio estas via nomo» laŭ mi signifas: ĉu via nomo estas io konata, aŭ ne? Alivorte esprimita la frazo: «Kio nomo estas la via?» estas tute erara, ĉar kiel sciante, pronomoj kun finiĝo «O» estas memstaraj vortoj, kiuj neniam akompanas la substantivojn, kiel adjektivoj kaj pronomoj kun finiĝo «U» estas ankaŭ memstaraj, sed ili povas akompani la substantivojn, kiel adjektivoj.

Ekzemple: oni ne povas diri: Kio nomo, kio homo, tio nomo, tio homo, sed oni devas diri: Kiu nomo, kiu homo, tiu nomo, tiu homo ktp.

Laŭ la sama logiko oni regule demandas: Kiu vi estas? (pri nomo) — Mi estas Ivan Sarafov. Kio vi estas? (pri ofico) — Mi estas lingvisto.

Via propra rezonado estas logika, gramatike certgrade korekta kaj enhavas la respondon mem al via demando pri «Kio estas via nomo» aŭ «Kia estas via nomo».

Ni nur precizige aldonas jenon:

La demanda frazo «kiu estas via nomo» kvankam gramatike korekta tamen ĝi ŝajnas nekutima al nia nacilingva praktikado (bulgarlingve: «što (kakvo) e vaŝeto ime») kaj pro tio ĝi estas evitinda. Ordinare en bona Esperanto oni demandas:

Kio estas tio? — Tio estas la tablo.

Kio estas la patro? — La patro estas viro.

Kio estas fiziko? — Fiziko estas scienco ktp.

Per «kia» oni demandas pri kvalito, naturo kaj speco de la aĵoj aŭ personoj, ekz.:

Kia vetero estas hodiaŭ? — Estas la plej bela, belega vetero.

Kia besto estas hundo? — La hundo estas danĝera.

Kian supon vi deziras, kun rizo aŭ kun vermiĉeloj? —

Kia ŝi estas? — Ŝi ne estas tia virino.

Pro tio demandante pri nomo de iu, persono ni neniam devas diri «kia estas via nomo?»

La korekta kaj komuniza koncerna demando estas: «Kiu estas via nomo? — Sed ofte multaj esperantistoj en tiuj kazoj demandas ankaŭ per la esprimovaj kaj ĝustaj «Kiel vi nomiĝas?» aŭ «Kiel vi estas nomata?».

Kaj fine ni donas ankoraŭ da ekzemploj el la Zamenhofa lingvouzo: Kiel oni nomas tian ilon? — La arbo sur kiu kreskas pomoj estas nomata pomujo.

St. M.

INSTRUA KONVERSACIO

1. Kio estas gazeto?
2. Kio estas ĵurnalo?
3. Kio estas revuo?
4. Ĉu ĵurnalo estas gazeto?
5. Ĉu ĉiu gazeto estas ĵurnalo?
6. Kia estas la formato de ĵurnalo?
7. Kion enhavas ĵurnalo?
8. Nomu kelkajn gazetojn, diferencajn laŭ speco.

Perioda presajo kun novaĵoj, informoj.
Ĉiutaga gazeto.
Perioda, ofte monata, broŝurita presajo, dediĉita al speciala fako.
Jes.
Ne ĉiu, nur ĉiutaga.
Granda.
Artikolojn pri politiko, akcidentojn, lokajn novaĵojn, felietonon, anoncojn ktp.
Ekzistas gazetoj politikaj, sindikataj, kulturaj, amuzaj, porinfanaj k. a.

9. Kiel nomiĝas persono, kiu mendis kaj ricevas regule gazeton? Kion li faras?
10. Kiel nomiĝas la persono aŭ organizaĵo, kiu varbas abonantojn. Kion li (ĝi) faras?
11. Kiel nomiĝas la persono aŭ institucio, kiu aperigas la gazeton?

Abonanto. Li abonas.

Aboniganto. Li (ĝi) abonigas.

Eldonanto, eldonisto.

Laŭ G. P. de Bruin (Laborista Esperantisto, n-ro 2—1959)

BULGARA-ESPERANTA VORTARO

Laŭ decido de CK de la Bulgara esperantista asocio, unu kolektivo de esperantistoj komencis labori por prepari novan sufiĉe grandan bulgaran-Esperantan vortaron. La ŝtata eldonejo «Nauka i izkustvo» (Scienco kaj arto) enskribis tiun ĉi vortaron en sian eldonplanon por la kuranta 1960 jaro kaj jam estas subskribita la necesa kontrakto inter la eldonejo kaj la aŭtoroj, ankaŭ kun la difinitaj redaktoroj de la vortaro.

Aŭtoroj de la vortaro estas: At. Atanasov — Ada, Ivan Sarafov, Asen Simeonov kaj Dimitr Simeonov. La redakcia komitato konsistas el: At. D. Atanasov — Ada, Violin Oljanov kaj Kiro Georgiev.

La redaktoroj laboras paralele kun la aŭtoroj, tralegante kaj korektante ĉiun ellaboritan parton de la manuskripto. Granda parto de la verko jam estas preta; la tuta manuskripto, definitive verkita kaj redaktita, estos donata al la eldonejo ĝis 31-a de majo 1960.

La vortaro ampleksos pli ol 500 paĝojn. Kie estas necese, la apartaj signifoj de la vortoj estas klarigataj ne nur per interpretaj esp. vortoj, sed ankaŭ per konvenaj mallongaj ekzemploj.

Por doni ideon pri la aspekto de tiu vortaro, ni prezentas ĉi tie, kiel ekzemplon, la interpreton de la vorto **ИМАМ**:

ИМАМ. 1. havi, posedi. **Имам къща** — havi domon. 2. konsideri, opinii. **Имам го за честен човек** — konsideri (opinii) lin honesta homo. **Да имаш да земаш** — ĝin vi ne ricevos de mi (vi ne sukcesos akiri, atingi ĝin). **Имам... години** — havi aĝon de... jaroj, esti... jara. **Тя има тридесет години** — ŝi estas tridekjara. **Имам на ръка** — disponi. **Имам пред вид** — konsideri, havi en konsidero. **Имаме се** — ni amas nin (reciproke).

En tia formo la vortaro certe estos valora helpilo por ĉiuj bulgaraj esperantistoj en ilia strebado por perfektigo en la internacia lingvo.

BIBLIOGRAFIO

Nederlanda esperantisto — N-ro 12, decembro 1959

El popola Ĉinio — N-ro 6, 1959

Franca esperantisto — N-ro 186, decembro 1959

Paco — N-ro 071, oktobro 1959

The Australian Esperantist — N-ro 12, okt.-nov. 1959

Nia ligilo — Bulteno de Esp. ligo en Izraelo — N-ro 2, decembro 1959

The worker esperantist — N-ro 22, decembro 1959

Esperanto — N-ro 650, januaro 1960

La Migranto — N-ro 17, 1959

Jugoslavia esperantisto — N-ro 11—12, 1959

De esperantist — N-ro 1, 1960

Germana Esperanta revuo — N-ro 12, 1959

New zealand Esperantist — N-ro 212—213, sept.—okt. 1959

Laborista esperantisto — januaro 1960

Dansk Esperanto blad — N-ro 1, januaro 1960

Van hoc (Vietnamio) — estas publikigitaj materialoj pri Vapcarov

«Grajnoj en vento» — N-ro 5, decembro 1959 — interesa gelernanta internacia gazeto, kies iniciatinto estas la svisa s-ano Marcell Erbetta kaj kiu aperas sub la sama titolo en 12 diversaj lokoj en la mondo. La menciita numero aperis en Polski Trâmbeŝ, Bulgario, kie estas la XI rondcentro. La numeron partoprenas Aŭstralio, Bulgario, Danlando, GDR, Jugoslavio, Kamboĝo kaj Rumanio. La gazeto bezonas kunlaborantojn el la nemenciitaj tie ĉi landoj. La instruistoj alilandaj petu detalajn informojn de Hristo Manolov, gimnazia direktoro en Polski Trâmbeŝ, Târnovsko, Bulgario.

KOREKTO

En la artikolo «Paralelaĵoj en la Esperanta vortaro» (Bulg. esperantisto. XXVIII, N-ro 12, pĝ. 13) enŝoviĝis kelkaj tre malagrablaj krudaj lingvaj eraroj: «La vorto (anst. vorton) etoso oni ne uzas...», «... bazo de konstruado» (anst. «de konstruado»), «Liaj, vortojn rilatas al vi» (anst. «Liaj vortoj...»).

La redakcio petas pardonon de la aŭtoro kaj de la legantoj.

KARA, HEJMA TER'

Teksto: Boris Tričkov

Muziko: Cvetan Radoslavov

Moderato
Unuopaj voĉoj



Al tas ĉe la blu a fon' la Bal-ka-no kun im-pon',
kaj, la su-no pri-o-ru-mas su-projn de Vi-to-sa mont'.
Ĉiuj voĉoj
Ka-ra, hej-ma ter', ni a firm-es-per', tre fe-kun-da,
tre a bun-da, mar-su al pros-per'! 1. 2. per'!

La fiero pra-Balkan',
glora fortikaj' de l' land',
kantas kanton
ribelantan
de pratempo ĝis estant'.

Refreno:

Kara, hejma ter',
nia firmesper',
tre fekunda,
tre abunda,
marŝu al prosper'!

2

Fluas blank-Danubo for,
flustras plaŭde al la bord'.
Rememoras
ĝi pri glora
kaj mirinda viv' kaj mort'.

Refreno.

Kaj Marica sen ripoz'
rakontadas kun patos',
ke ĉe l'kampoj
iam sangaj
nun aromas ruĝa roz'.

Refreno.

El bulgara: Stefan Kiraĝiev

INTERNACIA ASOCIO DE TEATRAJ KAJ FILMAJ ARTISTOJ

Pro la aparte multenombra partopreno de teatraj artistoj en la teatraj aranĝoj dum la 44-a U. K. en Varsovio, altrudiĝis memkompreneble la ideo de komuna kunveno inter ili kun la celo de reciproka interkonatigo, fakaj pridiskutoj sen antaŭdifinita tagordo kaj eventuala starigo de internacia faka asocio.

Okazis du kunvenoj. La unua — vendrede, la 7-an de aŭgusto, vespere post la prezentado de Internacia arta teatro. Ĝin ĉeestis nia eminenta samideano kaj pioniro sur teatra kampo sinjoro Julio Baghy, fraŭlino Marjorie Boulton, la reprezentantoj de la tri tea-

traj grupoj kiuj ludis dum kongrese kune kun la aktoraroj, sinjoro Jean Forge, konata pola filmreĝisoro kaj eminenta esperantisto, sinjoro Lech Piotrowski, dramaturgo de Bialistoka teatro, sinjoro Remigius Kossakowski, opera kantisto, kaj pluraj polaj eminentaj artistoj kaj aktoroj. Entute kvardeko da personoj.

Enkondukan parolon diris sinjoro Julio Baghy, kiu atentigis pri kelkaj problemoj kiuj staras antaŭ Esperanta teatro. La enkondukaj vortoj rezultigis viglan diskuton. Ĝi ĉefe direktiĝis al la baza deirpunkto por Esperanta teatro, nome la ĝusta kaj modela

prononcado. En tiu diskuto al sinjoro Baghy kontraŭstaris sinjoro Flego, sed en ĝi partoprenis ankaŭ fraŭlino M. Boulton, gesinjoroj Szemannovi, sinjoro Kossakowski, fraŭlino J. Ravšely kaj aliaj.

Morgaŭan tagon okazis dua kunveno. Bedaŭrinde ĝin ne partoprenis kelkaj partoprenantoj de la unua kunveno kaj kelkaj devis baldaŭ forlasi ĝin pro forvojaĝo. Kompenso tiun kunvenon ĉeestis la reprezentanto de beograda Esperanta teatra grupo sinjoro A. Sekelj.

Fine de tiu kunveno — laŭ iniciato de la polaj artistoj — estis fondita Internacia Asocio de Teatraj kaj Filmaj Artistoj (I. A. T. F. A.) kun jena estraro:

Prezidanto: Flego Srdjan

Vicprezidanto: Jovan Putnik

Sekretario: Lech Piotrowski

Komitatano por muziko: Remigiusz Kossakowski

Komitatano por filmo: Jean Forge

Komitatano: Mladen Šerment

Oni pridiskutis la celojn de I. A. F. T. A. kaj faris kelkajn decidojn. I. A. F. T. A. skize celas:

Instigi ĉiujn aktivajn profesiajn esperantajn artistojn sur teatra kaj filma kampoj aniĝi al ĝi. (Aliĝojn akceptas sekretario sinjoro Lech Piotrowski, Teatr im. Wegierki).

Interesigi pli forte la oficialajn Esperanto-instancojn kaj la tutan Esperanto-movadon pri la problemoj de la Esperanta teatro.

Doni ĉiun eblan teknikan kaj moralan helpon kaj apogon al naciaj Esperantaj teatraj grupoj jam ekzistantaj, instigi al fondiĝo de novaj naciaj trupoj kaj doni apartan apogon al Internacia arta teatro (I. A. T.).

Instigi kaj helpi la diskuton pri la Esperanta fonetiko kaj proponi praktikajn kaj ĝustajn solvojn por lernado de modela Esperanta elparolo sur baze de jam ekzistanta internacia modela prononcado. (Evidente oni devos revizii ĉion kion oni ĝis nun pli aŭ malpli ĝuste skribis pri Esperanta fonetiko).

Krome oni decidis, ke sinjoro Flego preparos bazan statuton de I. A. T. F. A. En la postaj tagoj la prezidanto kaj sekretario dufoje renkontiĝis kaj abunde pridiskutis la estontan agadon.

(Represita el «Esperanto» № 1).

Flego Srdjan

DEZIRAS KORESPONDI

USSR

Mihajlovoj Ljudmile, Voenvod Dos 1, kv. 4, Rostov-Don, No. 16, 17-jaraĝa lernantino, kun junuloj, pri muziko, arto, teatro.

Šerbina Galina, Kirovskij 15, Rostov-Don, 21 jaraĝa, kun pentristoj.

Kuzmickas Onunas, Kaunas Kapsu 60-2, Litova SSR — lernanto, interŝ. PM kaj IL.

Rostov — Don 7, Gazetnij pereulok 75, kv. 30 — Konovalova Tanja, 19-jara junulino, kun gejunuloj pri diversaj temoj.

ĈEHOSLOVAKIO

Fran. Friedrich Zold, instruisto, Streda n/Bodrogom — kun bulgaraj filatelistoj kaj gitaristoj. Interŝ. PM.

Vlastimil Polak, ul. Jana Kotery 1089, Nachod — 19-jara knabo, kun junulinoj pri diversaj temoj.

Cieszyn, Pl. Domunikanski 1 (T. G. K.) — Torchalski Stefan — studento, interŝ. PK, PM, arkitekturajn bildojn, muzikajn.

Cieszyn, ul. Armii Czervoney 43 — Criz Anna — je diversaj temoj.

Cieszyn, Frysztacka 241 (Internat Z.S.M.R.), Saternus Piotr — kun gejunuloj je diversaj temoj.

GERMANIO

Berlin — Biesdorf, Studentenheim I/235, W. Exner — kun perfektaj esperantistoj. 21-jara studento de medicino.

POLLANDO

Urszula Wantula, Ustvon, Soje 10, pow. Sieszyn — 17 jaraĝa, pri ĉiuj temoj, kun gejunuloj.

HUNGARIO

Lsursanna Angelini, Bankut, Arpat 22 — lernantino, kun gelernantoj.

11 novaj geesperantistoj — inĝenieroj, studentoj kaj oficistoj deziras korespondi kun bulgaraj geesperantistoj. Skribu al la adreso de ilia kursgvidanto:

Vasutas Eszperanto Szakkör, Dunakeszi, Mav. Vagongyar.

BULGARIO

Solenan vesperon kaj ekspozicion aranĝas E-societo «Verda stelo» en Stara Zagora je 1-a de majo. Interŝ. salutkartojn, propagandajn E-jojn, porpacajn mat.

Adreso: Stara Zagora, E-societo «Verda stelo».

